



la informilo

informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:

ESPERANTO ~ FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIIO

Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto
Maison des Jeunes et de la Culture


27, rue de la République, 54000 NANCY F

PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

nouvelle série
trimestriel

3^e tr. 1979

N°27



abonnement

un an: 12F

UNU JARO: 12F

(8 INTERN. KUPON.)

ANTO....FLASH★ESPERANTO....FLASH★ESPERANTO

★
LA SUISSE, berceau de l'Association Universelle d'Espéranto
FONDEE EN 1908, A ACCUEILLI POUR LA 5ÈME FOIS LE CONGRÈS MONDIAL

C'est à LUCERNE, une des perles de la Confédération, que se sont déroulées les assises de ce 64ème Congrès, du 28 juillet au 4 août, Congrès qui a réuni 1635 participants de 49 pays.

Dans son allocution d'ouverture, le Maire de la ville, qui s'exprimait en espéranto, déclara entre autre: "Plus que les paroles des hommes politiques souvent lancées au vent, les contacts amicaux personnels contribuent à la compréhension entre les peuples."

Si les Français et les Suisses étaient les plus nombreux on a noté pour la première fois dans un pays occidental, une participation substantielle de Chinois et de Soviétiques.

Le prochain Congrès de UEA se déroulera à Stockholm du 2 au 9 août 1980.

★
LA VRAIE VICTOIRE D'AUSTERLITZ

est sans doute la réunion dans la petite ville hollandaise -
-authentique homonyme de la célèbre cité tchèque- de 317
jeunes gens de 30 pays, du 20 au 27 juillet. Thème général du
Congrès: Union entre états... dans quels buts?

Tout comme pour le Congrès de UEA à LUCERNE de hauts fonctionnaires de l'ONU et des instances européennes ont participé aux débats. Sport, théâtre, musique, folklore étaient également comme à l'accoutumée inscrits au programme

 ASTERIX EN ESPERANTO! ★

Cette édition des aventures du malin petit Gaulois, due à une équipe internationale de traducteurs, a rencontré auprès des espérantistes un succès inattendu... Astérix ne veut-il pas cette fois lutter à sa façon contre les impérialismes linguistiques?

Presque simultanément est parue la traduction d'une œuvre poétique de H. MARTINSON, Prix Nobel 1974, "ANIARO".

Le résultat global de la vente d'œuvres diverses durant le Congrès de Lucerne s'est élevé à plus de 8 millions de centimes! La littérature en langue universelle se porte bien!



 LE ROTARY-CLUB ET L'ESPERANTO ★

Dans son numéro de mai 1979, la revue mensuelle des membres français de l'Association a consacré 24 pages à l'espéranto. Abondamment illustré et luxueusement présenté ce bulletin apporte la preuve des liens évidents qui existent entre la langue universelle et le mouvement rotarien d'essence internationale.

 UNE BROCHURE INFORMATIVE MODERNE... ★

... vient d'être éditée par les soins de l'UNION FRANÇAISE POUR L'ESPERANTO, 4bis rue de la Cerisaie, 75004 PARIS.

Sous le titre "UNE APPROCHE DE LA LANGUE INTERNATIONALE" elle offre au public, en 60 pages, un panorama complet du phénomène ESPERANTO. Essentiellement pratique elle comprend un répertoire d'adresses utiles, groupes, clubs, cours, etc. On peut se la procurer pour la modique somme de 5F au siège de UFE à PARIS ou près des groupes locaux.

Pour NANCY: Service de Librairie Espéranto, R. Degrelle, 11 Cours Léopold, 54042 NANCY CEDEX

 UN GRAND CONGRES CATHOLIQUE ESPERANTISTE A LUXEMBOURG ★

Réunissant 120 personnes de 20 pays il a été inauguré en présence de l'évêque de Luxembourg, de Madame le Maire de la ville qui a salué les congressistes en espéranto. En dehors des services religieux en langue mondiale, le Congrès s'est spécialement penché sur le problème "le droit à la vie".

Soirées culturelles et bal... ont apporté la détente après les travaux des différentes commissions.


 "L'ESPERANTO EST A LA PORTEE DE N'IMPORTE QUEL ENFANT qui fréquente l'école élémentaire..." (Paul MAUREILLE, Inspecteur d'Académie) ★

Pour la 3ème année consécutive, l'espéranto est de fait enseigné dans une classe de CM2 du groupe scolaire Jean ROSTAND à BAR-le-DUC, au titre des activités dites "d'éveil". Les parents apprécient cette initiative. Un cours de 2ème degré est dispensé au Collège voisin pour les élèves désireux de poursuivre l'étude de la langue internationale.



DOSSIER

A OUVRIR...



L'Espéranto à l'école; pourquoi?

Appel aux professeurs de langues vivantes.

Un des buts spécifiques de l'enseignement est d'apprendre non seulement des mots, des faits, des dates, des phénomènes, ... mais aussi de former sa pensée logiquement, rationnellement pour faire face dans la vie à toutes les circonstances, les maîtriser, les dominer.

Or, toutes les langues nationales sont truffées d'exceptions qui font, peut-être, leur richesse, mais pas leur facilité. L'espéranto, lui, a, entre autres richesses sa logique, sa régularité, son absence d'idiotismes; il permet de combattre le manque de rigueur. Ses structures rigoureuses mais libres favorisent la créativité. On peut inventer des mots en suivant des règles simples et ils seront compris par tous sur toute la terre.

L'espéranto est une langue démocratique: même les élèves les plus faibles peuvent suivre et voyant leurs efforts récompensés sont tentés de poursuivre. (L'acquis, après 100 heures d'étude est le même qu'après 600 heures pour les autres langues dites faciles).

Reconnaissant en l'espéranto une immense ouverture sur l'univers, les jeunes choisiront avec bien plus de sérieux l'autre langue utile à leur carrière ou répondant à des affinités propres (voisinage géographique, parentés étrangères, goûts historiques, langue ancienne ou régionale. Qu'ils veuillent connaître à fond les coutumes, l'histoire, la littérature d'un peuple précis ou qu'ils adoptent un projet personnel, scientifique, commercial, professionnel, ils sauront toujours que, par le monde espérantiste (associations dans 80 pays, délégués dans plus de 600 villes importantes), ils pourront nouer des relations avec d'autres humains qui ont fait le même raisonnement ... et la même moitié de chemin!

Des enseignants officiels de plusieurs pays d'Europe ont, par des essais comparatifs et contrôlés, prouvé que les élèves, après deux années d'étude du seul espéranto au lieu d'une tierce langue qu'ils démarraient la troisième année, avaient mieux assimilé cette dernière en fin de troisième année que d'autres camarades qui l'avaient entamée, eux seuls, trois ans plus tôt! Ce phénomène n'est pas miraculeux; en espéranto, on sent très vite que l'on peut s'exprimer et comprendre. L'absence des barrières monstrueuses des irrégularités permet de penser plus vite dans la nouvelle langue. L'esprit est plus libre; de suite les élèves peuvent correspondre réellement, pas par bribes ou phrases toutes faites: ils peuvent tout exprimer; de suite ils peuvent aller pratiquer leur savoir dans des rencontres internationales de jeunes ou lors de voyages chez des amis de n'importe quel autre pays du monde.

Le professeur de langues étrangères est, à priori, le premier personnage qui devrait se pencher sur l'espéranto. Il a une compétence d'enseignant et d'enseignant de langues. Il a la connaissance pédagogique pour faire profiter son élève des méthodes les plus modernes, il a déjà l'esprit ouvert sur d'autres cultures, d'autres races, d'autres façons de penser; sa propre instruction, son expérience lui permettront d'assimiler la langue internationale encore plus rapidement et plus profondément que d'autres. La pénétration des milieux espérantistes lui donnera le moyen d'assister à des conférences multinationales sans interprète (il y en a plusieurs chaque année en Europe); il y fera la connaissance d'autres professeurs de langues avec qui il pourra échanger, converser, débattre, au lieu de rester dans le cercle fermé de deux régions linguistiques, et puis, un jour, très certainement, l'espéranto sera admis dans l'enseignement officiel (une proposition de loi est soumise au parlement français) pour la présentation aux examens... il sera le premier intéressé, et c'est normal.

Il y a 20 ans, le 20-11-1959, était adoptée par l'Assemblée Générale des Nations

Unies, la Déclaration des Droits de l'Enfant. L'article 10 rappelle que l'enfant doit être élevé dans un esprit de compréhension, de tolérance, d'amitié entre les peuples, de paix et de fraternité universelle. Lui donner le goût et le moyen, très tôt, de s'intéresser et de se relier aux autres peuples, directement, c'est faire de ce droit notre devoir, avec générosité.

Le monde a besoin de vous! disait en conclusion de son intervention au dernier congrès mondial d'espéranto à Lucerne, Monsieur Robert Muller, secrétaire du Conseil Economique et Social des Nations Unies... le monde d'aujourd'hui et celui de demain; en conclusion de cette année de l'enfance, nous ne pouvons négliger un des grands moyens de création d'amitié et de rapprochement pacifique.

Nous pensons, nous, que les professeurs de langues étrangères voudront participer à cette oeuvre. Pour tout renseignement, prière de s'adresser à:

UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO
14 bis, rue de la Cerisaie
75004 - PARIS
Tél: 278.68.86.

ou

ACTIVITE ESPERANTO
MJC "Ph. Desforges"
27, rue de la République
54000 - NANCY
Tél: (83) 27.40.53.

Signé:

Madame Marie-Thérèse MAS
Maître-assistant
Université de Nancy 1

Monsieur Eugène DE ZILAH
Docteur en Philosophie
Chargé d'enseignement
Université de Metz.

Monsieur Yves GUEGUENIAT
Professeur agrégé de lettres
Lycée de Sélestat

Monsieur Pierre ETIENNE
Professeur certifié d'allemand
Lycée Jacques Callot, Vandoeuvre-lès-Nancy

Monsieur Edmond LUDWIG
Professeur certifié d'Allemand
Collège-Lycée de Munster

Monsieur Pol DENIS
Professeur d'Allemand
Directeur-adjoint
CES André Theuriet, Bar-le-Duc.



10^{ème} stage de l'espéranto parlé

10^a staĝo de parolata esperanto

→ 1 an kaj 2 an de decembro 1979 ←
 en NANCY, junuldomo "Philippe Desforges (MJC)
 27, rue de la République

Montriĝas pli kaj pli necese, por ĉiuj esperantistoj aŭ lernantoj en Orienta Francio, plej parte izolitaj en sia urbo aŭ vilaĝo, kaj ofte lernintaj Esperanton nur perkoresponde, renkontiĝi okaze de semajnfinaj staĝoj. Dum tiuj staĝoj, dank' al rektmetodaj lernolibroj diversgradaj, ĉiuj havas la eblecon paroli en Esperanto. La franclingvaj gramatikaj klarigoj estas minimumaj en la kursoj A1 kaj A2, preskaŭ ne ekzistas en la kurso B.

Ni invitas samtempe ĉiujn esperantistojn (eĉ komencantojn!) en najbaraj regionoj en Francio, Germanio, Belgio kaj Luksemburgio veni por praktiki kune la internacian lingvon.

ESTOS 4 KURSOJ

- KURSO A-1 → por tuj komencontoj
- KURSO A-2 → por ĵus komencintoj, kiuj atingis proksimume la duonon de la unuagrada kurso
- KURSO B → por tiuj, kiuj finlernis la unuagradan kurson: ili povos simple babili inter si helpe de la libroj menciitaj
- KURSO C → la lingvoposedantoj fajne konfirmos kaj rigore kontrolos sian lingvoposedon. (La studdokumentojn ricevos ĉiu partoprenonto komence de la staĝo) Bonvolu turni!



★ aliĝilo ★

Bonvolu detranĉi aŭ rekopii kaj sendi kun antaŭpago de 20F por ĉiu persono, kiel eble plej frue, kaj antaŭ la 17a de novembro 1979 al:

Fraŭlino Brigitte GIUMMELLY
 7, rue de la Scierie
 F 57100 THIONVILLE

(bonvolu krucumi laŭdezire en la eta kvadrato)

Sr° S-in° F-in° nombro de personoj:

NOMO: ANTAŬNOMO: NOMO k. ANTAŬNOMO de la akompanantaj personoj:

ADRESO: Naskiĝdato de junuloj sub 15 jaroj:

Tago kaj horo de alveno: Mi rezervas lito(j)n en ĉambro kun lito(j) sabate vespere.

Suplementaj noktoj (eventuale):

Mi rezervas manĝo(j)n sabate vespere por personoj, dimanĉe tagmeze por personoj.

Aliaj manĝoj (eventuale):

Mi partoprenos en kurso A1 A2 B C bonvolu turni!

PROGRAMO de la 10a STAĜO

SABATON, lan de decembro - bonvolu alveni antaŭ la 14a30, por ke la kursoj povu komenci-
ĝi akurate je la 15a. Jen la laborritmo: kurso (45 minutoj), ripozo (15 minutoj) ĝis la 18a45
Tiam funkcios libroservo. Je la 19a30, komuna vespermanĝo. Vespere ni ĝuos tre amikan kunĉe-
estadon kun diapozitivaj, kantoj, ktp...

DIMANĈON, 2an de decembro - matenmanĝo (atentu! nur ĝis la 8a horo!)
ni "parolos" de la 9a ĝis la 11a45 (samritme kiel sabate)
poste libroservo kaj ... tagmanĝo je la 12a30
posttagmeze povos okazi diskutoj (proponu temojn!), amika
kunestado, urbo- aŭ muzeovizito

Eblas trapasi ekzamenon nome: ATESTO PRI LERNADO	}	principe dimanĉe matene
" PRAKTIKA LERNADO		
" KAPABLECO (skriba parto)		

Ankaŭ eblas restadi en NANCY antaŭ kaj post la staĝo, sed bonvolu precizigi tion!

LA NOMBRON DE LA LITOJ ESTAS LIMIGITAJ JE 50

ALIĜU SUFIĈE FRUE !!

KOSTOJ

Aliĝkoto: 15F por ĉiu persono. La Federaciaj Membroj, Abonantoj al LA
INFORMILO kaj iliaj familianoj, la gejunuloj sub 15 jaroj
pagos nur 9F

Manĝo (tagmeza aŭ vespera) 14,50 F Tranoktado kaj matenmanĝo (por unu persono)
(En unulita ĉambro: 30F rezervitaj por la unuaj aliĝontoj En du-lita: 25F
En 3- 4-lita: 22F

Priatentu! Tiuj prezoj validas ekde la 1a de septembro 1979.
Eta plialtiĝo ebla.



Mi antaŭmendas la jenajn verkojn: (Kursoj A1, A2, infanoj)	Junulkurso	20F	<input type="checkbox"/>
	suplemento	4F	<input type="checkbox"/>
Plena vortaro	40F	<input type="checkbox"/>	
	kaseto	30F	<input type="checkbox"/>
Guide et programmes des examens	5F	<input type="checkbox"/>	
	disko-serio	30F	<input type="checkbox"/>
	Kurso B "Por la praktikantoj"	20F	<input type="checkbox"/>
	"Asteriks la Gaŭlo"	24F	
	Kurso C dokumentoj surloke disdonotaj		
Por ĉiuj (laŭdezire tutevidente!!...)	Lexique Fondamental E°-Français	9F	<input type="checkbox"/>
	Dictionnaire Pratique (F.E° kaj E°.F)	45F	<input type="checkbox"/>
Ni konsilas al la partoprenantoj en kursoj B kaj C posedi la 2 verkojn POR LA PRAKTIKANTOJ	Dictionnaire Français- Esperanto	40F	<input type="checkbox"/>
PAŜOJ AL PLENA POSEDO	Grand Diction. Esperanto-Français	60F	<input type="checkbox"/>
(eventuale) Mi deziras trapasi ekzamenon	atesto pri lernado		<input type="checkbox"/>
	atesto pri praktika lernado		<input type="checkbox"/>
	atesto pri kapableco		<input type="checkbox"/>

(La libroj menditaj estos je via dispono la 1an de decembro.)

INTERNACIA KATOLIKA KONGRESO ★

Ni estis 120 el 20 landoj por ĝui vere belan kaj interesan kongreson, kiu multe faris por kaj per Esperanto.

Por Esperanto: en la honora komitato kaj samtempe en la inaŭguro de la kongreso ĉeestis la episkopo de LUKSEMBURGO... kiu promesis lerni la lingvon, la ĉefministro de Luksemburgio, la urbestro de Luksemburgo, kiu finis sian agrablajn salutvortadon alparolante nin... en Esperanto, la direktoro de la gazeto LUKSEMBURGER WORT, kiu ĉiutage raportis pri la kongreso, samkiel plurfoje kaj abunde LE REPUBLICAIN LORRAIN kaj aliaj, aliaj...

La direktoro de la bierfarejo "DIEKIRCH", post nia vizitado, sin devontigis aldoni sur la boteletikedo la vorton "biero" post "bière", Bier" kaj "beer"!

Ciufoje, kiam okazis Di-servo, estis multe reklamite por Esperanto: en la katedralo dufoje, en la evangelia templo, en la granda preĝejo de Trevire kaj tiel plu. Vere ni ne estis sekto vivanta aparte aŭ disde de la aliaj "normale parolantaj" homoj!

Per Esperanto: la temo de la kongreso estis "LA RAJTO JE LA VIVO". Oni povis aŭskulti multnombrajn prelegojn pri la ĝenerala temo, sed ankaŭ pri "AMNESTIO INTERNA-CIA", pri lepruloj, pri la blindaj infanoj, pri la vivrajto de la maljunuloj kaj la eŭtanazio, pri la jaro de la infano. Vere la kultur nivelo kaj laborincito alte staris. Okazis, unufoje en katolika kongreso, granda balo kun granda orkestro.

Ni povis aplaŭdi surdmutulon, komprenantan Esperanton nur per la moviĝo de la lipoj, kiu pantomimis skeĉojn tiel brile kiel vere. Ni ektimis pro la zigzagoj sue eta podio de surbicikla klaino... tiuj du por la okuloj. Sed plie artplenis niajn orelojn iu granda poetino kaj iu elstara kantistino sen forgesi iun gurdiston kaj ties folklorajn kanzonojn.

Kion aldoni?... Tutsimple ke en Luksemburgio Esperanto progresas sufiĉe rapide kaj tiuj, kiuj vizitis ĝin dum aŭgusto revenis pli fortaj por labori por kaj per Esperanto. Kaj tio estas bona.

Roger DEGRELLE
Vic-Prezidanto de I.K.U.E.

TRIA ESPERANTO-SEMAJNO ★

Laŭ instigo de la nova Prezidanto de UFE, S-r^o Jean-Louis TEXIER, devus nun disvolviĝi en tuta Francio la 3a Esperanto-Semajno. La dato de tiu semajno povas esti varia laŭ la regionoj. Estas necese, ke ĉiu aktivulo adaptu sian agadon al la lokaj cirkontancoj.

Bonvolu informi min pri via agado, prefere sub formo de komunikoj koncizaj, pretaj por aperigo en la venonta INFORMILO.

UFE eldonis novan informilon pri esperanto (titolo: UNE APPROCHE DE LA LANGUE INTERNATIONALE). Multaj informoj pri E^o, listoj de aktivuloj en tuta Francio, ktp. Temas pri 60-paĝa broŝuro kies prezo estas 5F. Mendu rekte al UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS. 10 ekzempleroj kostas 40F, 50... 175F, 100... 325F, 500... 1500F.

UFE ankaŭ eldonis banderolojn por aŭtomobiloj (7cm X 40 cm), flava fono, verdaj literoj, teksto: ESPERANTO, LA LANGUE INTERNATIONALE, POURQUOI PAS? Sama prezo kiel por la broŝuro; mendu ankaŭ al UFE.

J.P. COLNOT

P.S.- Okaze de tiu "E^o-Semajno" ni uzis la tekston de alvoko al instruistoj de lingvoj proponitan de S-r^o J.L. TEXIER, Prezidanto de UFE, ni aldonis la subskribon de 2 universitataj profesoroj kaj de 4 instruistoj pri lingvoj en nia regiono (kun ilia permeso). Ni dissendis tiun cirkuleron al diversaj instruistoj de lingvoj kaj al 14 gazetoj. Tiun tekston vi legos en la franclingvaj paĝoj de la "I".

Pli ol 100 ekz. estas ankoraŭ disponeblaj... por eventuala disdono al viaj fakaj konatuloj. Bonvolu mendi ilin rekte al mi.

NIA 9a STAĜO...


Ĝi ja okazis la 16-17ajn de junio 1979 en NANCY. Ĝi estis sukcesa... kiel kutime. Partoprenis 57 personoj, el kiuj 11 Germanoj, 1 Greko kaj homoj el 5 departementoj en nia regiono, el DIJON, el Norda kaj Pariza regionoj. La kurson C gvidis S-r^o LUDWIG, B gvidis S-r^o GREINER, A2 S-r^o DE ZILAH kaj A1 S-r^o COLNOT. Okazis ekzamenoj, funkciis (vigle!) la libroservo...

Jen leteroj ricevita post la staĝo:

- el gesinjoroj GILOTEAUX (59170 CROIX):

...mia edzino kaj mi estas tre kontentaj pri la aranĝo kaj la taŭga kunvenejo. Gratulon pro la impona libroservo kaj al ĉiuj gvidantoj. (la kurso C, kiun ni ĉeestis, estis plej alloga pro la diversaj temoj proponitaj de la respondeculo)

... viaj staĝoj certe necesas por komencantoj kaj lernantoj de viaj korespondaj kursoj. Bone, ke partoprenas ankaŭ eksterlandanoj. Por "novbakito" la vizito al la staĝo certe povas havi favorajn rezultojn rilate la plian lernadon de la internacia lingvo.

... vian bultenon "LA INFORMILO" mi nun legos per "aliaj okuloj"

- el F-in^o Jeanne-Marie DE FEYEER (57600 FORBACH), kurso A2:

... la staĝo en Nancio profitigis min kaj dimanĉon mi ekparolis Esperanton kaj mi ne plu bezonis serĉi ĉiujn vortojn. Mi povas diri al vi, ke ĝi ankaŭ tre plaĉis al Evangelo Panoussis. Li skribis al mi de STUTTGART, ke li estas tre feliĉa ĉar li renkontis amikojn kiuj gastigis lin. Li estis tre malgaja, kiam li devis rehejmiĝi...

- el F-in^o LEPEIX (67000 STRASBOURG):

... la pasinta staĝo estis tiom bona, kiom la antaŭa, kvankam la lito estis tiom mola, kaj ĝi tre interesis min (la staĝo!)

... nun mi volas meti sugeston, kiu ne estas tute individua, ĉar samajn ideojn mi aŭdis de aliaj C-kursanoj: estus bona kurso D, en kiu oni povus doni al jam lertaj esperantistoj veran Esperanto-kulturon. Estus deziro, ke tiu kurso estu dediĉita al literaturo kaj kulturo esperantista...

nia vivo en...


NANCY

Kunvenon la 2an de oktobro (cele refunkciadon de kursoj) en la Junuldomo partoprenis nur 5 personoj (kelkaj aliaj skribis aŭ telefonis). Tamen ni sukcesis starigi pozitivan programon:

= 2 parolaj kursoj okazos en MJC Philippe Desforges, marde je la 20a30 ekde la 16a de oktobro (gvidos ĝin S-r^o SCHEFFER el METZ, nun studento en NANCY) kaj vendrede je la 18a45 ekde la 19a de oktobro (gvidos ĝin F-in^o MARCHAL).

= kursoj 2a kaj 3a-gradaj okazos alterne ĵaŭde je la 20a30. Precipe 3-foje monate entute.

= la perkoresponda kurso refunkcios, nova cirkulero estos eldonita, kiam aperos nia nova kasedo. La kotizo estos 80F (inkluzive la "Novan Racion Kurson kaj unu jaran abonon al la INFORMILO) plus eventuale la kosto de la kasedo.

= anoncoj en la Jarlibro de UEA:

por 1980 denove aperas 2 tutpaĝaj anoncoj en tiu Jarlibro, 1 paĝo pagita de la Turisma Oficejo, 1 paĝo pagita de la Junuldomo.

Viavice vi klopodu al via propra Oficejo por aperigi prospekton en E^o kaj okazigi mendojn per anonco en la Jarlibro. Skeptika Turism-Oficejo bonvolu turni sin al la Nancia por informiĝi: en Nancy oni estas tre kontentaj pri la rezultoj.

B A R - 1 e - D U C

Krom la aliparte jam aludita kurso en elementa lernejo okazos 2a-grada kurso por la lernintoj de la antaŭa lernejjaro kaj publika elementa kurso.

La 29an de novembro prelegos en la urbdomo Neder andano pri sia patrolando. Tiuj prelegoj, eĉ se la ĉeestantaro ne estas granda, tre efikas al la publiko, pro la diskonigo de informoj tiuokaze publikigitaj diversmaniere. La elspezoj ne estas tre grandaj kaj la rezultato kontraŭe, iĝas kontentiga por la progreso de nia afero.

Ni devas bedaŭri, ke B. le D. estas la sola urbo de orienta Francio enskribiĝinta en la reto de tiuj rond-prelegoj organizataj de UFE.



SEKVE AL LA REZOLUCIO DE LA DEPARTEMENTA KONSILANTARO de Meurthe-et-Moselle favore al Esperanto

Iom antaŭ nia junia staĝo mi skribis al 5 deputitoj de M. & Mlle por informi ilin pri la favora rezolucio kaj inviti ilin ĉeesti nian staĝon. Temas pri Sr^o COULAIS, deputito-urbestro de NANCY, S-r^o HABY, eks-ministro de Edukado (LUNEVILLE), Sr^o TONDON (NANCY 1), Dr^o ROSSINOT, (NANCY 3) kaj Sr^o PORCU (LONGWY). Mi invitis ankaŭ 2 konsilantojn.

Jen ricevitaj respondoj iom koncizigitaj:

EI Sr^o COULAIS: ... *Monsieur le Président et cher Monsieur, j'accuse réception de votre courrier et je vous informe que je suis personnellement favorable à l'adoption de la proposition de loi sur l'Espéranto....*

EI Sr^o HABY: ... *à titre personnel, je ne vois évidemment aucun inconvénient à la réussite de vos projets de développement...*

EI Sr^o GROSCOLAS: ... *Je viens d'avoir communication de la réponse du Ministre... Je regrette ce type de réponse et suis à votre disposition pour envisager une autre forme d'action...*

Jen la aludita respondo de la Ministro al la Prefekto de Meurthe-et-Moselle:

... par lettre citée en référence, vous m'avez transmis le voeu du C.Gl..... J'ai l'honneur de vous informer qu'il n'est pas envisagé de prendre une mesure de cette nature. Le caractère artificiel de cette langue, ainsi que son absence de support culturel, ne permettent en effet pas de prévoir son insertion dans les programmes scolaires...

pour le Ministre, le Chef de Cabinet,

EI Sr^o HURIET ... *j'avais espéré pouvoir me libérer pour saluer les stagiaires que vous avez accueillis... malheureusement cela ne m'a pas été possible et je le regrette vivement... Vous félicitant pour l'action que vous menez, je vous assure, Monsieur le Président, de mes sentiments distingués et dévoués;*

Mi ankaŭ ilatis kun Sr^o LAURAIN, deputito de Mozelo, kiu skribis la 6an de aŭgusto:

... en réponse à votre lettre du 24 juin dernier, j'ai l'honneur de vous informer que je suis en relation permanente avec Monsieur ROUGET pour élaborer ensemble la proposition de loi sur l'espéranto qui est effectivement la meilleure forme d'action possible face aux fins de non-recevoir qui émanent régulièrement du Ministre de l'Education. Nous espérons déposer cette proposition de loi lors de la prochaine session parlementaire. Je ne manquerai pas évidemment de vous en envoyer un exemplaire et de voir avec vous toute l'exploitation que l'on peut en faire dans notre région...

Krome Sr^o Greiner skribis al Generalo BIGEARD (TOUL), kaj Sr^o VIVIER al Sr^o GOEURIOT (JOEUF)

J.P. COLNOT

KOMITATO DE O.E.F. : En la listo de niaj komitatanoj en LA INFORMILO n^o26, mankis la nomo de S-in^o Danielle HAUSER en VAUDŒUVRE 54500.

Ni petas pardonon.

 VIA NOMO EN LA TELEFONA JARLIBRO? ★

Se vi posedas privatan telefonon, ĉu vi klopodis pri senpaga enskribo de via nomo en la "flava" profesia parto de la telefona jarlibro por 1980, sub la rubriko "PROFESSEURS d'ESPERANTO" ?

Skribu rekte (aŭ telefonu!) al AGENCE DES TELECOMMUNICATIONS, kiu servas vian loĝejon... kaj bonvolu informi min pri tiu enskribo!

J.P.C.

NASKIĜO

★ *DAPHNE ĵus ĝojigis per sia alveno en la mondon siajn gepatrojn, ges. Bernard AUNIS, en STRASBOURG, 52 Bd d'Anvers*

funebro

S-in° PAESCHEN, bopatrino de la redaktisto de LA INFORMILO, patrino de Sinjorino DENIS forpasis.

Al S-in° DENIS, al ŝia edzo kaj gefiloj ni prezentas niajn plej sincerajn kondolencojn.

Fraŭlino Odile MOUREAUX el Laneuvelotte, nur 36-jara, forpasis post longa kaj suferiga malsano. Ŝi multe laboris sur la tereno de la malsanuloj. Ŝi vojaĝis tutmonde el sia ĉambro per Esperanto-leteroj kaj -radio elsendoj. Ŝi fino ŝi konservis sian plengeĝan koron kaj entuziasman karakteron.

Al ŝia nun sola patrino, al ŝiaj multnombraj geamikoj de Esperantujo, al ŝia tuta familio, ni rediras nian amikecon kaj plej elkorajn kondolencojn. Ŝi restos por tiuj, kiuj konis ŝin, iu rideto fidela sur sufera vizaĝo.

Roger DEGRELLE

Perkoresponda Kurso ★

Dum la lasta lernjaro ni dissendis entute 80 komunikojn al la regiona gazetaro. Almenaŭ 26 el ili aperis. 140 personoj petis informojn, 55 aliĝis al la kurso. (pasintjare: 68).

La rezultoj ĝis nun ne ŝajnas tre brilaj: nur 3 gelernantoj atingis la kursfinon. Verdire mankas raportoj de diversaj kursgvidantoj. Sekve ni petas tiujn el vi, kiuj ne raportis de 4 monatoj, bonvoli informi min pri la laboro (aŭ nelaboro) de viaj gelernantoj. Dankon!

Ni do gratulas: Jeanne-Marie DE FEYTER, 57600 FORBACH, gvidita de Sr° VANOLA
Bernard ZIEGLER en METZ, gvidita de Sr° LINDAU
Jacqueline BARTHELEMY en COLMAR, gvidita de Sr° LUDWIG

Krome el la antaŭa lernjaro atingas la kursfinon Lidia MOSCONI, 68400 RIEDISHEIM, gvidata de Sr° GROSSMANN.

Ni preparas nun eldonon de kasedo, kun teksto de la NOVA RACIA KURSO. Mi petis helpon de specialisto por efektiviĝi tiun projekton, ni ricevis la afablan permeson de SAT-Amikaro. Ni esperas per tiu modernigo pligrandigi la efikon de nia kurso.

La ĝisnuna kurso FERREZ, kiun ni ne plu povas aĉeti, tre baldaŭ malaperos post elĉerpigo de 10 restantaj ekzempleroj

J.P. COLNOT

Lasta minuto!...

tuja sporo de multfaceta kultur-rezuso en Esperanto...

"MONATO" ...
...ĉiujn sciigojn en la venonta numero de "LA INFORMILO"

* cotisations 1980 *

Vous venez de recevoir le n° 27 de la INFORMILO, avant-dernier de votre abonnement 1979.

Afin de recevoir toute la série de l'an prochain -ainsi que les autres revues auxquelles vous êtes abonné par ailleurs- vous trouverez ci-dessous le nouveau tableau des cotisations pour 1980. Nous vous invitons à vous en acquitter dès maintenant, cette procédure facilitant grandement notre travail tout en vous assurant un service ininterrompu de vos revues.

Nous vous recommandons vivement de choisir votre cotisation à partir de la catégorie 3. Ce faisant, vous apportez votre adhésion et votre soutien à l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO, association qui agit sur le plan national tant sur le plan informatif général que sur celui des relations avec les instances officielles. Vous concevez aisément que son efficacité et sa crédibilité dépendent essentiellement du nombre de ses adhérents.

COMMENT PAYER VOS COTISATIONS?

1°/ Par virement postal à: *FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO
CCP 1997 72 W NANCY*

2°/ Par chèque bancaire à l'ordre de la même Fédération (*ce chèque doit être envoyé à notre trésorier, S-r° André GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM*)

TABLEAU DES COTISATIONS 1980

CAT	- de 22 ans	+ de 22 ans
1 - abonnement simple à LA INFORMILO _____	13F	13 F
2 - adhésion simple à la FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO		
<i>membre fédéral (avec abonnement à LA INFORMILO) _____</i>	9F + 13	9F + 13
<i>membre fédéral sans abonnement (pour les autres personnes de la famille par exemple...) _____</i>	9F	9F
3 - adhésion à la Fédération et à l'U.F.E.		
<i>membre titulaire junior (avec la revue FRANCA ESPERANTISTO) _____</i>	63F + 13	
<i>membre titulaire (+ de 22 ans) avec la revue F.E. _____</i>		90F + 13
<i>membre sympathisant _____</i>	25F + 13	25F + 13
4 - adhésion couplée à U.F.E. et à U.E.A. (en plus de celle à la Fédération)		
<i>membre individuel (reçoit F.E. et l'annuaire de U.E.A. _____ + la revue KONTAKTO si moins de 25 ans) _____</i>	111 F + 13	138F + 13
<i>membre individuel (reçoit F.E., l'annuaire de UEA et la revue mensuelle mondiale ESPERANTO... + la revue _____ KONTAKTO si moins de 25 ans)</i>	183F + 13	210F + 13

IMPORTANT ←

- A/ tous les membres reçoivent la carte fédérale et le bulletin trimestriel régional LA INFORMILO (pour les abonnés) *s'ils sont nouveaux adhérents
- B/ les membres de l'UFE et de l'UEA reçoivent en plus les cartes de membre de UFE et de UEA (s'ils sont nouveaux adhérents) et les coupons 1980 donnant droit aux services des délégués mondiaux dont l'adresse se trouve dans l'annuaire de UEA.
- C/ les membres de l'enseignement sont invités à mentionner leur profession car ils seront ainsi inscrits d'office au GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES (GEE) sauf catégorie 2.
- D/ les jeunes gens jusqu'à 25 ans voudront bien mentionner leur date de naissance (inscription d'office à l'ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE FRANCAISE (JFEO) sauf cat. 2 Ils recevront en plus le bulletin KONCIZE.

- E/ les membres qui payent leurs cotisations par l'intermédiaire du GEE ou de JFEO, ainsi que les membres à vie, voudront bien payer à part leur abonnement à LA INFORMILO comme indiqué.
- F/ exceptionnellement, les membres du groupe de STRASBOURG, dont la trésorière est S-in° STAHLBERGER, 17 rue de Lampertheim, 67800 BISCHEIM, sont priés de verser leurs cotisations au

CENTRE CULTUREL ESPERANTO

CCP: 49917 STRASBOURG

en y ajoutant leur cotisation au groupe de Strasbourg: 10F

Priserbuminda! ★

Ĉu vi neniam aŭdis la jenan rimarkon: Esperanto?... Ĉu tio ankoraŭ ekzistas? Post nia lasta regiona kongreso en Colmar, antaŭ kiu la legantoj de la lokaj gazetoj ĉiutage legis pri esperanto dum pli unu semajno, ne-esperantistaj konatuloj miris, ke nuntempe oni nenion plu aŭdas pri esperanto...

Gesamideanoj, ni reagu! Ni reklamu! Sed jen demando: kiel efike kaj regule reklami? Vi verŝajne interkonsentas kun mi, kiam mi asertas, ke ideos de unuopulo neniam tiom taŭgas, kiom ideoj de aro da pripensantoj. Mi estas certa, ke ĉiuj, vi havas ideojn! Bonvolu sendi ilin al mi, por ke mi kompilu -ĉiujn proponojn kaj konatigu ilin al ĉiuj niaj federacianoj aŭ eĉ alifederacianoj. Ĉar jen: Ĉu tia nepre ada reklamlaboro en la tuta lando, en ĉiu federacio, pere de ĉiuj lokaj gazetoj - kiuj cetere sufiĉe facile konsentas presi niajn komunikojn kaj artikolojn - ne instigus la grandajn naciajn gazetojn kaj la radion kaj televizion priatenti nian aferon?

Oni skribu al:

M. Edmond LUDWIG
46, route de la Schlucht

STOSSWIHR

F 68140 MUNSTER

Pst!!

La tajpinto de la poezio sidanta komence de la libro-listo petas ĉiujn legantojn lin senkulpiĝi pro grava tajperaro. Kiu trovos ĝin, tiu bonvolos mem korekti...

... Senŝerce serĉu

Kaj kulp' emerĝu!

R.D.

Soneto: NANCIO

Kun siaj oraj pordoj la stanislasa placo
Reĝecas malhumile dum nokto kaj dum tago.
Fieras Nancianoj, ĉar la turisma vago
Altiras tien homojn sen ĉeso kaj sen laco.

Mi tamen plendkonfesas kun iom da agaco
Kaj malpli da hontemo, ke estas vera plago
Viziti l'urbon sen kontemplado al zigzago
De la kvartalo inta kaj ties ĉarmpalaco

Plej varte konservita, en kiu vivis dukoj
Homecaj kaj kuraĝaj, sen vido al muzeoj
Pri plantoj kaj pri bestoj, pri fiŝoj kaj pri kukoj,

Pri fero kaj pri domoj, en kie la trofeoj
De l'historio nia fariĝas kondukiloj

Al la popolo de la lorenaj epopeoj.

omage al mia amata
naskiĝurbo...

Roger DEGRELLE

LIBROSERVO

Ĉu	Ano de Danto Alighieri	32,00
Libro	Al Toronto	14,50
Alportas	Anni kaj Montmartro	22,00
Veran ĝuon	Bodil kaj la bando	22,00
Al legamanto ?	Erilo de Fantono	11,00
Ĉu gluti vortaron,	Ĉu li bremsis sufiĉe ?	33,00
Travivi historion,	Ĉu vi kuiras ĉine ?	33,00
Ĉu deĉifri krimromanon,	Dekkinga flugas	16,50
Ĝesuĉi el la versaĵsuko	Disko	16,50
Gis kerne kalocsaja juko	Doktoro Dorner	35,00
Kaj simili ajn Valanon	Else kaj Bo	6,00
Aŭ sperti noblebrion	Ferio kun la morto	10,00
Sen trafi amaron ?	Fianĉo de l'sorto	50,00
En granda kvanto	Je la flanko de la profeto	80,00
Daŭrinstruon	Forto de l'vero	10,00
Kolportas	Gajaj klubversperoj	5,50
Kribron.	Gizela kaj Roberto	5,50
Nu :	Granda kaldrono (la)	100,00
Ĝardeno de la urbestro	Grete kaj Jep	6,50
Judoj sen mono	Gudrun	28,00
Kanako ek Kananam	Infanoj en Toronto	16,50
Kiel akvo de l'rivero	Junuloj en Toronto	21,50
Lanternisto (La)	Kie boacoj vagadas	11,00
Marta	Kit vivas	29,00
Mirinda eliksiro (La)	Legu kaj ridu	9,00
Morsoklubo	Metropoliteno	63,00
Nekonata konato (La)	Misteroj de l'vivo	10,00
Ni aktoras	Naŭzo (La)	19,00
Ni komedietas	Ne tiel sed tiel ĉi	10,00
Ni ludas teatraĵojn	Ni, homoj	5,50
Nokto da timo	Ni ludas	5,50
Patroj kaj filoj	Nia originala prozo	11,00
Printempo en aŭtuno	Novaj Esperanto-historietoj	11,00
Savo el la neĝo	Pli ol fantazio	9,00
Skurila libro (La)	Rakontu, samideano	11,00
Sur insulo malproksima	Senlingvulo (La)	27,50
Trans la fabeloceano	Suno kaj pluvo	14,00
Vagado sub palmoj	Taglaboristoj	30,00
Verda robo	Urbo de terura nokto	11,00
	Venis viro	16,50
	Vivo de Zamenhof	42,00

VORTAROJ

Lexique fondamental Esperanto-Français	6,00
Dictionnaire Pratique Esperanto-Français/Français-Esperanto	40,00
Dictionnaire Français-Esperanto (Léger-Albault)	40,00
Grand Dictionnaire Esperanto-Français (Waringhien)	60,00
Plena Vortaro (Waringhien)	38,00
Plena Ilustrita Vortaro (Kolektivo)	180,00

ĈETU POR VIA PLEZURO

POR NIA HELPO

POR AMIKA DONACO

LERNOLIBROJ

Esperanta legolibro	10,00	Gaja leganto	7,00
Junulkurso	20,00	Suplemento al la J.	4,00
Nouveau Cours Rationnel	30,00	Esperanto por Infanoj	8,00
Por la Praktikantoj	20,00	Paŝoj al plena posedo	23,00
Preparo, al kapableco	15,00	Gvidlibro por ekzamenoj	5,00

PROPAGANDILOJ

Tu seras Espérantiste	1,00	Une humanité, une langue	6,00
Une langue internationale pour le monde et pour l'église			10,00

STUDOJ

Esperantologiaj studoj	57,00	Poŝatlaso de la mondo	15,00
------------------------	-------	-----------------------	-------

POEZIAĴOJ

Somera simfonio (sonetrao)	11,00	La ĝoja podio (Schwartz)	33,00
La stranga butikoj (Schwartz)	21,00	Verdkata Testamento (id)	21,00
Izolo (Kalocsay)	42,00	Ezopa Saĝo (Kalocsay)	33,00
Kien la poezio? (Clark)	23,00		
La ĥimeroj (Nerval - tra. de Waringhien)			31,00
Les 24 sonnets de Louise Labé - tra. de Theodor Oeste			32,00
Frithjof-Sagao			82,00
Primico (Rabindranath Tagore - Probal Daŝgupto)			27,00
La Renesanca periodo (el diversaj - Waringhien)			52,00
La trofeoj (Heredia - Waringhien)			31,00
Rimletoj (Boulton-Aulde)			11,00
Ĝis nun (Daphne Lister)			11,00
Fabloj (Krilov - tra. de Rublov)			50,00

FUNDAMENTAJ LIBROJ

Fundamento de Esperanto	25,00	Fundamenta Krestomatio	55,00
Lingvaj Respondoj	17,00	Sankta Biblio	60,00

Ĉiuj kvar aŭ skribitaj aŭ prezentitaj de Zamenhof

Disko

Tra la Mondo (Tzaut)	55,00	Damjanov	25,00
Al vi de mi (Alberta Casey)	55,00		

NOVAĴOJ

ASTERIKS LA GAŬLO (Gosciny kaj Uderzo - tra. de pluraj)	24,00
- se vi volas, ke la aliaj aperu en Esperanto, vi devas nepre aĉeti !	
TRA DEZERTO KAJ PRAARBARO (prezentita en la franca televido)	29,00
ĈIU ĈIUN (Teo Jung) Sep jardekojn en la Esperanto-movado	
Memoraĵoj de 86-jara optimisto	
De la fondinto de Heroldo de Esperanto	77,00

Mendoj sendotaj al Roger DEGRELLE
11, Cours Léopold
54042 NANCY CEDEX

Por pagi bonvolu atendi la fakturon, kiu entenas la prezon de la libroj kaj la sendkostojn.

La supraj prezoj ĈIAM povas - bedaŭrinde - ALTIĜI.

ASSOCIATION DES RESIDENTS ET AMIS DU NEUDORF - ★ ATELIER D' ESPERANTO

koresponda adreso:

Jacqueline Lépeix
82 avenue Jean Jaurès
F-67100 Strasbourg

kunlaboranto:

Adolf Schärger
Postfach 1966
D-7640 Kehl

Estimataj gesinjoroj!

La Esperanto-grupo de ARAN, 14 rue de la Schwanau, F-67100 Strasbourg, komunikas:

I programon de sia propra aktivado:

- 1 Parola kurso por komencantoj ĉiun mardon je la 18a horo kaj duono
- 2 Konversacia kurso por progresantoj. Ĉiu kunveno konsistos el: mallonga studo de la parolata lingvo; prelego; debato post la prelego.

Datoj kaj temoj elektitaj por la venontaj kunvenoj:

- jaŭdon la 18an de oktobro je la 19a horo: la situacio de Civiluloj kiuj rifuzas soldatiĝi en Okcidenta Eŭropo
- sabaton la 10an de novembro je la 14a horo: la Eŭropa Komunumo (kun preleganto el Pollando)
- jaŭdon la 6an de decembro je la 19a horo: lumbildprelego pri enlandaj orkideoj

II informojn ricevitajn de najbaraj Esperanto-grupoj:

Strasburga Kultura Esperanto-Centro:

La prezidanto memoras

- la kunvenojn, kiuj okazas regule ĉiun duan mardon de la 19a-21a horo en Cabinet Werner, 3 rue des Arquebusiers (Contades)
- la korespondan Esperanto-kurson
- la Esperanto-kursojn en la Universitato
- la bibliotekon metatan al la dispono en la sidejo 1 place Mérian

Nancy:

La lan kaj 2an de decembro 1979 okazos la 10a staĝo de Esperanto parolata ĉe "Activités Espéranto"; MJC, avenue de la République, F-54000 Nancy. Esto tri grupoj: komencantoj, progresantoj, Esperanto-parolantoj.

Alta Elzaco:

La 11a staĝo de Esperanto parolata okazos la 14an kaj 15an de junio 1980 en "Ried et Hardt", F-68230 Soultzbach. Informos: Edmondo Ludwig, 46 route de la Schlucht, Stosswihr, F-68140 Munster

Metz:

La kongreso de la Orienta Federacio de Unuiĝo Franca por Esperanto okazos la 26an kaj 27an de aprilo en Metz. Informos: S-ro De Zilah, 39 rue Joseph Henot, F-57070 Metz

Sarlanda Esperanto-Ligo:

La SEL organizas kulturajn semajnfinojn de la 2a - 4a de majo kaj de la 26a - 28a de septembro 1980. Informas: Sarlanda Esperanto-Ligo, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt Nun ĝia vigla libroservo proponas ankaŭ interesajn brokantojn librojn.

Stuttgart:

La grupo de Stuttgart kunvenas ĉiun unuan sabaton de la monato.

- la 3an de novembro: inform- kaj varb-entrepreno kun la estro de la E-o - Centro de Luksemburgo kaj prelego de s-ino Kruse pri: "Infanoj de la E-o - vilaĝo Bona Espero en Brazilio"
- lan de decembro: Zamenhof-soleno en naturamika domo "Fuchsrain". Informas: Johannes Windisch, Dürerplatz 4, D-7740 Nürtingen.




distra angelo



KRUCVORTENIGMO

HORIZONTALALE

1 multaj, multaj plantegoj! - prepozicio. 2 franca departemento - arbo el humida grundo. 3 nigra lignito (rad.) - peco de ludilo (radiko). 4 kiu scias bone juĝi aŭ taksu la aferojn - malgranda kvanto. 5 li allogas la aŭskultantojn. 6 liaj helpantoj portis longan nazon. 7 oriente de Eŭropo - cirklaj ornamoj. 8 li estis ventoreĝo (rad.) - loĝinto oriente de la Morta Maro - pronomo (rad.) 9 granda ĉefurbo - difinita per precizaj reguloj. 10 en la sama familio - li kaj ŝi - prefikso



VERTIKALE

1 knedeblo tero - nesimpla gaso. 2 en la gamo - imposto - sufikso. 3 blovmuzikilo - batrako vivanta sur arboj. 4 4 sufikso - en la aero - elektra unuo. -5 tradicia procedaro (rad.) - malpardonemo. 6 movata de vento - longe movi al si. 7 naive rigardadi - aerveziketo (rad.). 8 el kelkaj fruktoj - senvosta vertebrulo - pronomo. 9 Sufikso en kemio - aŭstralia lacerto. 10 multe da tempo - interjekcio - per kio oni faras ion.

SILABENIGMO

pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj silaboj vi plenigu la kolonojn laŭ la donitaj difinoj dekstre. La 1a kaj la 3a kolonoj eldonas proverbon se vi legos ilin vertikale.

a bo da el el era es ga ge i ie ivo la lo ma ma mo n no no nt nuo o o og ok omo op os ot pa pi ra rmo se so so ta tu vi zo

+ - + -	farunaĵo
+ - + - -	pintarko
+ - + -	infana ĉe W. Auld
+ - + -	senpense rigardadi
+ - + - -	atestas ĉagrenon
+ - + - -	forte deziranta ion
+ - + - -	komuna nomo por la dazipedoj
+ - + - - - -	intime instruata al la adeptoj
+ - + - - - -	vestaĵo
+ - + -	itala insulo
+ - + - -	procedo de dekoracio
+ - + - - -	jarparto
+ - + - - - -	pelto de didelfo
+ - + - -	artiko
+ - + - -	teologo de moskeo
+ - + -	kastrita taŭro

Unua kaj tria kolonoj de supre malsupren legataj donas proverbon.

EL NIAJ POETOJ...

limerikoj

Dormas lacerto
murtrue kaj subsune
en lacinerto
sed kuros ĝi aŭtune
jen ja la certo!

Ĉe voj' platano
atendas kun supiro
ke post brems-vano
aŭdiĝu ŝir-deliro
de ajn plat-ano!

En kaf' sukero
likvigas far la movo
de etkulero.
Forflugas pro mortblovo
vort' sen suk-ero!

Roger DEGRELLE

Solvoj de krucvortenigmoj 26 kaj 27 aperos en la venonta n° de LA INFORMILO